Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2020

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2020 okazis entute unu ordinara klubkunveno (ĉeestis 4 la 24an de februaro) antaŭ ol la norvega socio fermiĝis pro la pandemio de KOVIM-19. Ankaŭ okazis ĝardena festo en junio (ĉeestis 12).

Aldone okazis interretaj kunvenoj per la konferenca programo Zoom. Tiuj kunvenoj estis: jarkunveno en marto (ĉeestis 6 membroj kaj unu infano) kaj du babiladaj klubkunvenoj en novembro (ĉeestis 4 kaj 7 respektive). Do la tri klubkunvenojn averaĝe partoprenis 5, kaj averaĝe por ĉiuj kvin aranĝoj partoprenis 6,8.

Kompare, en la ordinaraj klubkunvenoj de la ne-pandemiaj jaroj 2006–2019 partoprenis meznombre: iom malpli ol 7; inter 6 kaj 7; 6,6; 6,5; 7,1; 6,9; 6,9; 7,4; 6,8; 6,6; 6,4; 5,1; 5,2; kaj 4,7 en 2019.

La plena listo de kunvenoj en 2020 estas:

– 24.2.: Klubkunveno okazis hejme ĉe membro. Temo: Ĉiu rakontas pri io.
– 30.3.: Jarkunveno.
– 13.6.: Ĝardena festo.
– 5.11.: Klubkunveno okazis en interreto. Temo: Ni interbabilis, rakontis pri okazintaĵoj kaj okazontaĵoj, montris bildojn ktp.
– 18.11.: Klubkunveno «GET-babilado» en interreto. Ni interbabilis, rakontis ktp.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2020, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj pri GET en la gazetaro.

Membrostatistiko

En 2020 GET havis 11 membrojn. (Por la jaroj 2006–2018 la nombroj estis respektive: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, 15, 16, 16, 14, 13, kaj 12 en 2019). Ekde 2019 NEL kalkulas la klubsubtenon laŭ la membronombro la 31an de oktobro, antaŭe la 31an de decembro.

Partopreno en naciaj aranĝoj

La 21an de novembro 2020 okazis la landa seminario de NEL per la interreta konferencprogramo Zoom. La temo estis «Renovigo kaj plijunigo de la skandinava komunumo». La seminario ankaŭ estis internacia evento, ĉar ĝi fariĝis la 69a seminario en la serio AMO (Aktivula Maturiĝo) de UEA. Je la maksimumo partoprenis 37 personoj en multaj landoj. Partoprenis 5 en Trondheim: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Judith Parelie Abrahamsen, Herman Ranes, Ulf Stenhaug kaj Jacob Fjeld Grevstad.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Okazis pluraj internaciaj aranĝoj en la reto. Herman Ranes partoprenis la Virtualan Kongreson de Esperanto, organizita de UEA. Tamen precipe menciindas ke niaj amikoj en Darmstadt, ĝemela urbo de Trondheim, ĉiusemajne aranĝis ĝemelurbajn rondojn konversaciajn per la interreta konferencprogramo Skype. Oftaj partoprenantoj estis Herman Ranes, Ulf Stenhaug kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen, kelkfoje kun Judith kaj la filo.

Vortara laboro

Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Ne estis aktiveco dum 2020.

Interreta aktivado
GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE.

Je la jarfino membris 16 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2019 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, 22, 20, 19, 19, 19, 16). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2020 sendiĝis 20 mesaĝoj per la listo (por la jaroj 2012–2019 respektive: 68, 96, 45, 56, 38, 66, 51, 97).[1]

Biblioteko kaj aliaj libroj
La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007. Dum la jaroj, libroj el tiu valizo disdonaciĝis kiel premioj dum la Zamenhofaj festoj, kie kutime okazas lotumado. En 2016 Arne Olav Mjøen transdonis eĉ plian skatolon da libroj origine de la eldonejo. Ankaŭ tiuj estas vendeblaj kaj ne bibliotekaj.

Arĥivo
La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj
Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2020.

Ekstera mono
Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2020 Norsk Tipping pagis al la klubo 3625,58 kronojn (2480,07 en 2019). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet næring og samfunn*, kiu dum 2020 pagis al la klubo 0 kronojn (500 en 2019).

Postenoj

Estraro dum 2020, elektita de la Jarkunveno la 30an de marto 2020
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 30an de marto 2020
Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

[1] Origine erare raportiĝis pri 95 en 2019.

Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2020
Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

Estraraj postenoj de klubanoj en NEL kaj Legaco Uhlen en 2020
Vicprezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Anstataŭanto 2 de NEL: Herman Ranes
Revizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Estrarano kaj prezidanto de Legaco Uhlen: Herman Ranes
Estrarano de Legaco Uhlen: Judith Parelie Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2020
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2020
Anstataŭanto por NEL en la Domkomisiono: Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegito de UEA: Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 11an de marto 2021.